ILEI-simpozio pri la konferenca temo

La sesan tagon de la konferenco de ILEI en Krakovo esperantistaj kaj neesperantistaj scienculoj prelegis pri demandoj ligitaj rekte aŭ malpli rekte al la konferenca temo:

La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado.

Estis prezentitaj en la pola lingvo aŭ Esperanto 18 prelegoj pri edukspertoj kaj tendencoj en la eduksistemo de Pollando kaj edukagado en Esperantujo, teoriaj kaj praktikaj aspektoj de interkultura komunikado kaj lingvoinstruado, lernfaciligaj efikoj de Esperanto kaj aliaj lingvoj lernitaj kiel la unua post la gepatra, ekzisto kaj konsisto de Esperanta kulturo, instruado de universalaj etikaj valoroj, Esperanto kiel interlingva perilo de literaturaj verkoj, Esperanto en la lingvopolitika kunteksto de EU kaj Kaukaza regiono, Esperanto kaj tutmondiĝo ktp.
La prelegantoj venis el 11 universitatoj kaj altlernejoj de Pollando, Italio, Usono, Japanio kaj Ukrainio. Resumoj de la prelegoj kaj biografioj de la aŭtoroj estas publikigitaj en la Konferenca libro. Elektitaj prelegoj espereble estos publikigitaj en IPR kaj retejo de ILEI.

La simpozio finiĝis per vigla paneldiskuto pri la problemoj kiujn la simpozio tuŝis kaj pri eblaj solvoj por laŭeble plej efika kontribuo de Esperanto al konstruado de pacaj pontoj inter la popoloj, kiuj estos ankoraŭ traktataj en la lasta konferenca tago dum laborgrupaj sesioj pri inter-universitataj kunlaboroj, interŝanĝoj kaj projektoj.